

## Meti maron en Saharon? *ne* realigita scienc-teknika apliko apogita de Harold TARRY, poste dua ĉefredaktoro de *Esperanto*: la ĝis nun nekonita ĵusa antaŭulo de Hector HODLER en 1906

Ĉar KAEST laŭnome kaj ĉefe temas pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko ni unue interesiĝos pri stranga grandioza projekto subtenita i.a. de franca eksa politeknikano komence de la 1880-aj jaroj: *antaŭ* la naskiĝo de Esperanto. Do la maro en Saharo ĉiuokaze estintus scienc-teknika apliko *ne* de Esperanto sed nur forte apogita de tiam *ankoraŭ ne* esperantisto, kaj poste priskribita de alia franca esperantisto, la verkisto **Jules VERNE**: sian lastan *finitan* romanon li titolis en 1904, en la manuskripto, *La Mer saharienne*, kaj ĝi aperis en 1905 kun la titolo "Invado de la maro"<sup>1</sup> (sen rolo nek mencio de Esperanto en ĝi, male de la sekva).

Kaj en dua, ĉefa parto, dank'al dudeko da neeldonitaj leteroj inter la tri unuaj redaktoroj de la revuo *Esperanto*, ni ĉefe studos la efemeran rolon de tiu sama Harold TARRY, kiel dua ĉefredaktoro en 1906: inter Paul BERTHELOT, ties fondinto en 1905, kaj Hector HODLER, kiu plene transprenis la taskon nur komence de 1907. Tio iomete kompletigas nian kontribuon al la ~~tuj-aperonta~~ dulingva libro *Hector Hodler: Pacisma sinteno* (**Ĝenevo: Éditions Notari, 2020, 232 p.**), kun kontribuo ankaŭ de Ulrich LINS, kaj antaŭparolo kaj tradukoj de Mireille GROSJEAN, **tiam** ILEI-prezidantino.

### Unua parto: la projekto de sahara maro

Harold TARRY naskiĝis la 14-an de decembro 1837, do preskaŭ ekzakte 22 jarojn antaŭ ZAMENHOF, kaj duonjarcenton antaŭ la naskiĝo de Esperanto. Li studis ĉe Politekniko (dum Paul BERTHELOT *malsukcesis* la parolan parton de la kandidat-konkurso ĉar li aŭdacis kontraŭdiri al sia ekzamenanto, fakte prave cetere, kio nur pligravigis lian kulpon...)<sup>2</sup>. Profesie TARRY estis inspektisto pri financoj, sperta pri fervojaj kompanioj<sup>3</sup>, kaj jam misiita almenaŭ du jarojn en Alĝerio<sup>4</sup>. De 1880<sup>5</sup> ĝis almenaŭ 1883<sup>6</sup> li estis "Delegito de la ministrejo de Financoj al la Komisiono de la Transsahara fervojo"<sup>7</sup>, en kiu la nun plej fama membro estis

<sup>1</sup> Jules VERNE, *L'Invasion de la mer*, Paris, 1905, 330 p.; konsultebla ĉe gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k96076223.

<sup>2</sup> Carlo [Charles] BOURLET, "Paul Berthelot", en *La Revuo* n° 56, aprilo 1911, p. 375; citita en Marcel DELCOURT kaj Jean AMOUROUX, "Berthelot, la fondinto", en *Esperanto* n° 834, junio 1975, p. 103-104, kaj n° 1182, p. 127.

<sup>3</sup> Enkadre de la ministreja servo "Ĝenerala Inspektado de la Financoj", en kiu li dungiĝis en 1861\*, li ricevis misiojn ĉe la Orienta kaj ĉe la Suda Fervojaj Kompanioj (respektive en 1864-1866 kaj almenaŭ en 1877). ([www2.culture.gouv.fr/LH/LH266/PG/FRDAFAN83\\_OL2569066V004.htm](http://www2.culture.gouv.fr/LH/LH266/PG/FRDAFAN83_OL2569066V004.htm))

\* *Dictionnaire historique des inspecteurs des Finances 1801-2009*, sub direktado de Fabien CARDONI, Nathalie CARRÉ DE MALBERG, kaj Michel MARGAIRAZ, Vincennes, 2012, p. 1056.

<sup>4</sup> En 1868 kaj 1875 ([www2.culture.gouv.fr/LH/LH266/PG/FRDAFAN83\\_OL2569066V004.htm](http://www2.culture.gouv.fr/LH/LH266/PG/FRDAFAN83_OL2569066V004.htm)); kaj lia manuskripta slipo ĉe gallica.bnf.fr/ark:/12148/btv1b8452938m/f3: "1869. Voyage à Toung[g]our et au Souf. 1875 Id[em] au sud de Bou[-]saada.") Li deklaris ke li estis membro de la organiza komitato de la internacia Kongreso de geografiaj sciencoj\* (komitato kies alia membro, inter la 27 nomoj listigitaj, estis Jules VERNE)\*\* sed, eble ĉar

li intertempe devis foriri de Parizo pro sia alĝeria misio (kiu komenciĝis la 1-an de marto 1875 dum la kongreso malfermiĝis nur kvin monatojn pli poste), lia nomo ne estas en tiu listo sed nur en alia: tiu de la pli ol mil "antaŭpagintaj membroj" (*membres souscripteurs*)\*\*\*. \*[www2.culture.gouv.fr/LH/LH266/PG/FRDAFAN83\\_OL2569066V004.htm](http://www2.culture.gouv.fr/LH/LH266/PG/FRDAFAN83_OL2569066V004.htm).

\*\* "Comité du Congrès: II. – Section d'organisation", en *Congrès international des sciences géographiques tenu à Paris du 1<sup>er</sup> au 11 aout 1875, Tome 1<sup>er</sup>*, Paris: Société de géographie, 1878, p. LV. \*\*\* *Congrès (...)*, citita verko, p. XLIX.

<sup>5</sup> Évelyne BARBIN, "Harold Tarry, un polygraphe en Algérie: météorologie, astronomie, archéologie (...)", en *Bulletin de la SABIX* (Asocio de amikoj de la biblioteko kaj de la historio de Politekniko), n-ro 64, 2019, p. 87.

<sup>6</sup> Harold TARRY, Délégué du Ministère des Finances à la Commission du chemin de fer Transsaharien, "Excursion archéologique dans la vallée de l'Oued Mya", en *Revue d'ethnographie*, tome 2<sup>e</sup>, Paris: Ernest Leroux, 1883, p. 21.

<sup>7</sup> Temis pri "Commission supérieure pour l'étude des questions relatives à la mise en communication par voie ferrée de l'Algérie et du Sénégal avec l'intérieur du Soudan", kreita per dekreto, la 13-7-1879 (Jules GRÉVY [Prez. de la Resp.], en *JORF*, 14-7-1879, p. 6634-6635)\*; kaj dekrete likvidita la 13-an de februaro 1884 (?).

\* TARRY ne aperas en la tiea listo de la *unuaj* membroj.

Ferdinand DE LESSEPS, fininta en 1869 la Suez-kanalon (160-kilometran longa). DE LESSEPS, kun kiu TARRY estis en persona koresponda rilato<sup>8</sup>, estis ankaŭ membro de la Supera komisiono, kreita la 27-an de aprilo 1882, por ekzameni la "projekton de interna maro en la sudo de Alĝerio kaj Tunizio prezentita de S-ro Komandanto ROUDAIRE"<sup>9</sup>. Eble TARRY kaj François Élie ROUDAIRE jam renkontiĝis en Alĝerio en la printempo 1875<sup>10</sup>, sed tio ne gravas.

Dum tria restado en Alĝerio TARRY aldoniĝis al ekspedicio de kolonelo FLATTERS kiu foriris de Laghouat<sup>11</sup> (350 kilometrojn sude de Alĝero). Sed TARRY survoje haltis por restadi ĉefe en Ouargla, bonŝance ĉar ĉiuj aliaj francaj membroj de la ekspedicio (foririnta de Ouargla la 4-an de decembro 1880)<sup>12</sup> estis poste mortigataj, la 16-an de februaro 1881.

Kaj denove bonŝance, dek kilometrojn sude de Ouargla, ĉe la uedo kaj subtera rivero Mya li retrovis la malnovan urbon Sedrata, kies moskeon, kelkajn domojn, kaj ĉefe la t.n. "palacon"<sup>13</sup>, li parte elsabliligis per laboro de ĝis 70 lokaj dungitoj.<sup>14</sup> Tiel li povis skribi al la ĝenerala guberniestro de Alĝerio, la 5-an de februaro 1881:

"Sufiĉas frapi la teron per piedo<sup>15</sup> por ĉie elvenigi belegajn urbojn (...) kies domoj forlasitaj antaŭ 800 jaroj ne plu havas posedantojn. Sufiĉas sondi ĝin por elfluigi, kiel antaŭe, verajn riverojn kaj revenigi al la tersurfaco tiun riveregon kiu iris ĝis la Gabesa golfo miksiĝi kun la Mediteraneo, riverego kiun nia generacio *vidos flui ĝis la interna maro* de Komandanto Roudaire, *kien la transsahara fervojo alportos la produktojn el Sudano.*"<sup>16</sup>

Nu, TARRY tiel ligis la realigojn de ambaŭ projektoj: unuflanke transsahara fervojo, kaj aliflanke estigo de sahara maro per 240-kilometra kanalo fosuta ekde la Gabesa golfo en Tunizio ĝis la regiono de la t.n. *chotts* [ŝot], efemeraj sal-akvaj lagegoj kiuj plej parte troviĝas (ekz-e kiel la Morta maro) sub la nivelo de la maro. Sed la du projektoj rapide estis ligitaj per komuna aŭ almenaŭ sama sorto.

– La supera komisiono pri kreado de interna maro, la 7-an de julio 1882 (post 528 p.)<sup>17</sup>, "konsiderante ke la elspezoj de la estigo de la interna maro estus senproportiaj kun la rezultoj

<sup>8</sup> "The General Secretary (...) read a telegram, dated Jelfa, February 28th, from M. Tarry to M. de Lesseps (...) ("Proceedings of foreign societies: Geographical Society of Paris, March 4th, 1881", en *Proceedings of the Royal Geographical Society and Monthly Record of Geography*, NS vol. III, 1881, p. 242.)

<sup>9</sup> *Commission supérieure pour l'examen du projet de mer intérieure dans le sud de l'Algérie et de la Tunisie présenté par M. le Commandant Roudaire*, Paris: Ministère des Affaires étrangères, 1882, p. 15.

<sup>10</sup> La dua misio de TARRY en Alĝerio komenciĝis la 1-3-1875 (dum la projekto jam famiĝis la antaŭan jaron)\*; kaj ROUDAIRE estis revokata el Alĝerio al la metropolo la 20-4-1875 sed tio efektiviĝis nur la 19-5-1875 ([culture.gouv.fr/LH/LH192/PG/FRDAFAN83\\_OL2393081V002.htm](http://culture.gouv.fr/LH/LH192/PG/FRDAFAN83_OL2393081V002.htm) kaj (...) 003.htm), kaj promociata, la 6-10, oficiro de la Honora Legio (001.htm). \*Per artikolo anoncanta ke en dec. 1873 la supera konsilio de Alĝerio voĉdonis mon-atribuon por niveli per plej modernaj niveliloj la regionon de la *chotts* [ŝot]: la efemeraj sal-akvaj lagegoj kiuj plej ofte troviĝas (ekz-e kiel la Morta maro) sub la nivelo de la maro. (E. ROUDAIRE, "Une mer intérieure à rétablir en Algérie", *Revue des deux mondes*, 3<sup>e</sup> période, 44<sup>e</sup> année, vol. 3, majo-junio 1874, p. 323-350.)

<sup>11</sup> H. TARRY, "Excursion archéologique dans la vallée de l'Oued Mya", *Revue d'ethnographie*, vol. II, 1883, p. 21.

<sup>12</sup> Henri BROSELARD, *Les deux missions Flatters au pays des Touareg Azdjer et Hoggar*, [Paris], 1889<sup>2</sup>, p. 214.

<sup>13</sup> Vidu la postan planon de la arkitekto FAUCHER (1942), reproduktita de Cyrille AILLET kaj Sophie GILOTTE, "Sedrata: l'élaboration d'un lieu de mémoire", en *Revue des mondes musulmans et de la Méditerranée*, n° 132, decembro 2012, p. 17, ĉe [journals.openedition.org/remmm/7923](http://journals.openedition.org/remmm/7923).

<sup>14</sup> H. TARRY, citita art., kaj "Les villes berbères dans la vallée de l'oued Mya", en *Revue d'ethnographie*, vol. III, 1884, p. 1-44. Vidu ankaŭ ĉi ties antaŭ-resumon de Ferdinand DELAUNAY en "Académie des Inscriptions et Belles-lettres: Séance du 19 mai", en *JOFR*, 14<sup>e</sup> année, n° 139, 22-5-1882, p. 2743-2744.

<sup>15</sup> Plej verŝajne aludo al Moseo frapanta la rokon per bastono (*Nombroj* 20, 11).

<sup>16</sup> Letero de H. TARRY al la ĝenerala guberniestro de Alĝerio, datita de Ouargla, la 5-an de februaro 1881, publikita kun la titolo "L'occupation d'Insalah", en *L'Exploration*, 6<sup>e</sup> année, vol. XIV, 2<sup>e</sup> semestre 1882, p. 7.

<sup>17</sup> Kaj al tio aldoniĝis i.a. jenaj du antaŭaj raportoj: *Rapport à M. le Ministre de l'Instruction publique sur la Mission des chotts: Études relatives au projet de mer intérieure*, par le capitaine Roudaire, extrait des Archives des missions scientifiques et littéraires, 3<sup>e</sup> Série, Tome Quatrième, Paris: Imprimerie nationale, 1877 ("2<sup>e</sup> éd. augmentée des rapports de l'Académie des sciences"), 138 p. ([books.google.com/vc/books?id=l0JDAAAIAAJ](http://books.google.com/vc/books?id=l0JDAAAIAAJ)); kaj ĉ. 200-paĝa raporto de Komandanto ROUDAIRE, *Rapport à M. le ministre de l'Instruction publique sur la dernière expédition des chotts: Complément des études relatives au projet de mer intérieure*, Paris: Impr. nationale, 1881.

kiujn oni povas esperi", opiniis "ke ne estas kialo por la franca registaro kuraĝigi tiun entreprenon"<sup>18</sup>. Tio metis **la nur provizore** finan punkton al la afero **ĉar, kvankam ankoraŭ** en 1925 tria esperantisto, la generalo DELCAMBRE<sup>19</sup>, prezidanto de la Meteorologia Societo de Francio<sup>20</sup> (kies sekretario TARRY mallonge estis duonjarcenton pli frue)<sup>21</sup>, franclingve **nur menciis kun bedaŭro**, en la revuo *La Météorologie*, "la studojn okazigitajn, antaŭ 30 jaroj, pro la projekto de artefarita sahara maro, kiu naskis tiel grandajn esperojn en Nord-Afriko"<sup>22</sup>, **tri jarojn poste, la bostona inĝeniero Dwight BRAMAN relanĉis ĝin**<sup>23</sup>... **ĵus antaŭ la usona kaj**

<sup>18</sup> *Commission supérieure pour l'examen du projet de mer intérieure dans le sud de l'Algérie et de la Tunisie présenté par M. le Commandant Roudaire*, Ministère des Affaires étrangères, 1882, p. 528 (kaj ankaŭ p. 545-546). Cetere, ĉar la ĝenerala KAEST-temo estas "efektivigi daŭripovan evoluon", pri la *daŭripoveco* de la interna maro kalkuloj montris ke nur post unu jarcento kaj duono la sala proporcio egaligus al tiu de la Amaraj lagoj (ĉe la Suez-kanalo), kaj en tiuj ĉi la proporcio ŝajnas tre favora por la fiŝoj, kiuj *venas* en la Amarajn lagojn (el malpli salita apuda lago). \* Plie la maro, ĉ. dekoble pli vasta ol la Morta maro, nur post pli ol unu jarmilo\*\* komencus fariĝi saturita (de salo, per elvaporigado pro la potencega sunradiado). Do ne estis antaŭvidataj malbonaj ekologiaj konsekvencoj, eĉ male (ekzemple mildigo de la ĉirkaŭa klimato).

\* Laŭ "Note du Commandant Roudaire sur la question de savoir si la mer intérieure pourrait se transformer en marais salants", en *Commission supérieure*, cit. verko, p. 186. \*\* Post ĉ. "1304 jaroj" laŭ liaj kalkuloj (samloke).

<sup>19</sup> Pri lia esperantisteco: E[mile] H[OUBART], "Generalo Delcambre", en *La Movado* n° 80, nov. 1925, p. 145 kaj 153; "Honoraj distingoj", en *La Movado* n° 154, marto 1932, p. 44; Ernest ARCHDEACON, "La retraite du Général Delcambre", kaj DELCAMBRE, "Comment je suis devenu Espérantiste", en *Franca Esperantisto* II, 8, julio 1934, p. 119, [https://digital.onb.ac.at/RepViewer/viewer.faces?doc=DTL\\_5822136](https://digital.onb.ac.at/RepViewer/viewer.faces?doc=DTL_5822136) [vidaĵo 122].)

Pli detale pri li vidu Jacques LORBLANCHET, "Il y a 70 ans: Le Général Delcambre", en *Arc en Ciel* n° 134, reproduktita ĉe: [anciensmbh.cluster026.hosting.ovh.net/wp-content/uploads/2018/06/general\\_delcambre.pdf](https://anciensmbh.cluster026.hosting.ovh.net/wp-content/uploads/2018/06/general_delcambre.pdf).

<sup>20</sup> Sub lia direktado estis verkata, de 1926 ĝis 1931, en 7 **kajeroj, la poste 1-voluman (459+36-paĝan) *Lexique météorologique***, kies 7-a kajero, 36-paĝa, havas kiel subtitolon: ***Fascicule VII: Équivalence des termes météorologiques français en allemand, anglais, espagnol, italien, polonais, portugais, roumain, russe, serbe, tchèque et espéranto*** [kun ĉi-lingvaj terminoj provizitaj de Maurice ROLLET DE L'ISLE] (Parizo: Office National Météorologique, serio "Ministère de l'Air: Mémorial de l'Office National Météorologique de France", legebla ĉe [http://bibliotheque.meteo.fr/exl-php/util/documents/accede\\_document.php?1632837531349](http://bibliotheque.meteo.fr/exl-php/util/documents/accede_document.php?1632837531349)). Kaj, ankaŭ pri apliko de Esperanto en tekniko, li samtempe estis ĝenerala inspektoro pri Aeronautiko, kaj komisiita de la ministro pri Aerveturado (tiam Paul PAINLEVÉ, 6-12-1932) por fariĝi la ligila agento inter la ministro kaj la esperantistaj asocioj: dank' al lia interveno (28-11-1933), "la ministro pri Aerveturado P[ierre] Cot decidis malfermon de laŭvola esperanta kurso en la Supera Nacia Lernejo por Aviado". (Ministra letero al la Direktoro, 8-1-1934, publikigita de J[ean] C[OUTEAUX], "Dans l'Aéronautique", en *Franca Esperantisto*, 2-a Jaro, n-ro 3, februaro 1934, p. 41-42, ĉe: [digital.onb.ac.at/RepViewer/viewer.faces?doc=DTL\\_5822136](https://digital.onb.ac.at/RepViewer/viewer.faces?doc=DTL_5822136) [vidaĵo 45]); [Pierre] PETIT, Konstanta Sekretario de SFPE, "XXXI-a Nacia Kongreso en Bordeaux: Raporto", en *FE*, 2-a jaro, n-ro 6, majo 1934, p. 92.) La sekva ministro (Victor DENAIN) daŭrigis la kurson (40 aliĝintoj) en 1934-1935 (*FE*, p. 119; kaj lia persona letero al la Prezidanto de SFPE publikigita de Jean COUTEAUX, "L'esperanto dans la pratique", en *FE*, 3-a jaro, n-ro 12, januaro 1935, p. [1], ĉe: [...]DTL\_5822136 [vidaĵo 184]).

<sup>21</sup> Kvankam "amatora meteorologo"\* TARRY estis vicsekretario (1872-1873) kaj unu el la du sekretarioj (1874-1875), de la *Société Météorologique de France*. ("Commission de rédaction", en *Nouvelles météorologiques*, 5<sup>e</sup> année, 1872, p. [4], ĝis 8<sup>e</sup> année, 1875, p. [4].) \* Frédéric SOULU, *Développement de l'astronomie française en Algérie (1830-1938)*, doktora disertacio ĉe Universitato de Nantes, 2016, vol. 1, p. 266.

<sup>22</sup> Bibliografia notico pri la verko de Hippolyte DESSOLIERS, *Comment l'homme accroitra progressivement les pluies des régions arides* [Kiel la homo iompostiome kreskigos la pluvokvanton en la dezertaj regionoj], Imprimerie Algérienne, Alger, 1921", en *La Météorologie: Revue mensuelle de météorologie et de physique du globe, et Annuaire de la Société Météorologique de France, NS Tome XVI*, 1925, p. 327. En tiu notico, kvankam eksa politeknikano, DELCAMBRE skribis: "La delonge malaperintaj projektoj pri kreo de interna maro estis rekonataj kiel nerealigeblaj pro tiu ĉioneniiga argumento laŭ kiu la Saharo estas ĉe nivelo super tiu de la Oceano." Klariga hipotezo pri tiu erara rezono estas, ke li tro rapide legis Esperantan tradukon de artikolo prave indikinta: "Multaj personoj opinias, ke la Saharo estas la fundo antaŭ nelonge elaltiĝinta de la oceano. Tio estas malprava. La tuta Saharo havas mezan altecon da [tiele] 460 metroj (la meza alteco de Eŭropo estas nur 290 metroj)." \* Sed tiu meza alteco tute ne malebligas ke *partetoj el ĝi, la chotts*, kuŝas ja sub la nivelo de la Oceano.

\* Profesoro Jean MASSART, "Notoj pri dezerto (El kurso de -): La Saharo", en *Internacia Scienca Revuo* N° 29, 3<sup>a</sup> Jaro, 1906, p. 129; tradukis [la instruisto] J. VERBANCK [estonta vicprez. de la bruselo grupo "Nova Pioniro"].)

<sup>23</sup> "Vast Lake Planned to Irrigate Sahara: Boston Engineer's Project for Inland Sea Tentatively Accepted by France", en *The New York Times*, 16-9-1928 ([nytimes.com/1928/09/16/archives/vast-lake-planned-to-irrigate-sahara-boston-engineers-project-for.html](https://www.nytimes.com/1928/09/16/archives/vast-lake-planned-to-irrigate-sahara-boston-engineers-project-for.html)).

monda krizo, kaj lia propra morto en junio 1929. Sed "la ideo estis denove relanĉata en la jaroj 1952-1953, sekve de esploradoj efektivigitaj de petrolaj kompanioj en diversaj lokoj de la dezerto"<sup>24</sup>. Kaj

"nelonge antaŭ ol akcepti la sendependiĝon de Alĝerio, Francio relanĉis la projekton en 1960, sendube nur kiel influimedon sur la traktadon. Sed kial Tunizianoj kaj Alĝerianoj denove parolis pri tio en 1983?"<sup>25</sup>

– Pri la projekto de transsahara fervojo, en kies komisiono TARRY membris – kaj pro kiu, verŝajne, li ricevis sian gravan tunizian distingon Oficiro en la ordeno de la Nicham [tiele] Iftikhar<sup>26</sup> (kvankam ĝis nun, laŭ la malmulto kiun ni scias, ankaŭ povus esti pro la internamara projekto) – , post fino de ĉi ties komisiono verŝajne en februaro 1884<sup>27</sup>, nur multe pli poste nur parta konstruado realiĝis dum nur malpli ol dek jaroj, inter 1941 kaj 1949. La ĉefan rolon en ĝi ludis la eksa estro de Politekniko René CLAUDON (cetere mia avo): unue nomumita "prezidanto de la direktanta komitato de la fervojo Mediteraneo-Niĝero" (12-4-1941), li estis nomumita en 1945 "prezidanto de la *ret-konsilio* (*conseil de réseau*) de la fervojoj de Mediteraneo ĝis Niĝero"<sup>28</sup>. Sed la konstrulaboroj estis oficiale ĉesigitaj en 1949<sup>29</sup>.

Por ambaŭ projektoj, cetere ambaŭ ja kun forte koloniismaj flankoj, fine mankis firma volo de la franca registaro.

## Dua parto: Harold TARRY, dua ĉefredaktoro de *Esperanto*

### Transiro inter la du aferoj

Ni revenu al Harold TARRY. Li baldaŭ estis revokita al la metropolo kaj nomumita al relative malgravaj postenoj, antaŭ ol esti frue kaj trude emeritigita en 1887, pro kialo nekonata de ni.<sup>30</sup>

---

<sup>24</sup> Ramzi TEJ [d-ro en hist., Sfakso], "Les difficultés de la modernité dans le bassin méditerranéen", en *Int. Journal of Humanities and Cultural Studies*, III, 1, junio 2016, p. 2022 (el: [ijhcs.com/index.php/ijhcs/issue/archive](http://ijhcs.com/index.php/ijhcs/issue/archive)).

<sup>25</sup> G. GOHAU "Analyse d'ouvrage: René LÉTOLLE et Hocine BENDJOUDI, *Histoire d'une mer au Sahara: Utopies et politiques* (séance du 26 nov. 1997)", en *Travaux du Comité Français d'Histoire de la Géologie*, 3<sup>e</sup> série, t. XI, 1997 ([annales.org/archives/cofrhigeo/mer-sahara.html](http://annales.org/archives/cofrhigeo/mer-sahara.html)).

<sup>26</sup> La 9-an de aŭgusto 1877 ([www2.culture.gouv.fr/LH/LH266/PG/FRDAFAN83\\_OL2569066V004.htm](http://www2.culture.gouv.fr/LH/LH266/PG/FRDAFAN83_OL2569066V004.htm)), do la jaron post la fino de lia dua misio en Alĝerio (la 1-an de marto 1976). (samloke) Kaj la 5-an de novembro de la sama jaro li estis ankaŭ nomumita, sed tio estas malpli signifa, kavaliro de la Honora Legio (franca). ([www2.culture.gouv.fr/LH/LH266/PG/FRDAFAN83\\_OL2569066V001.htm](http://www2.culture.gouv.fr/LH/LH266/PG/FRDAFAN83_OL2569066V001.htm))

<sup>27</sup> Laŭ Jacques VALETTE, "Quelques aspects nouveaux de l'expédition Flatters", en *Revue de l'Occident musulman et de la Méditerranée*, n° 15-16, 1973, "Mélanges Le Tourneau: II", (p. 375-390), p. 378, ĉe [persee.fr/doc/remmm\\_0035-1474\\_1973\\_num\\_15\\_1\\_1257](http://persee.fr/doc/remmm_0035-1474_1973_num_15_1_1257). Sed ni ne trovis en la *JOFR* la dekreton datitan laŭ li je la 13-a de februaro 1884, kaj ne povis kontroli jenan indikitan referencon: "Aux AN [ĉe la Naciaj arkivoj], F.12/2363".

Nu, TARRY ankoraŭ diris en 1991, uzante *prezencojn*: "Speciala komisiono iam nomumita de S-ro Freycinet, havas kunsidojn en kiuj ĝi ekzamenas la rimedojn por alveni, sen investi tro multe el la mono de la [publika] Trezorejo, al la solvo kiun oni celas, t.e. direkte al la lago Ĉado aŭ alia punkto."\* Do tio ŝajnas aludi al la sama transsahara komisiono, kreita de la franca prezidento per dekreto proponita de la eksa politeknikano Charles DE FREYCINET, ministro de la Publikaj laboroj: ĉu do daŭre ĝi ankoraŭ funkciis sep jarojn post 1884?

\* "Procès-verbal, séance du 20 février 1891: Communication orale", en *Compte rendu des séances de la Société de géographie et de la Commission centrale: Année 1891*, Paris: Société de géographie, 1891, p.120, ĉe [archive.org/details/comptesrendusde19fragoog/page/n130](http://archive.org/details/comptesrendusde19fragoog/page/n130).

<sup>28</sup> La 5-11-1945, per dekreto ("*arrêté*") de la ministro de la publikaj laboroj kaj de la transportoj, publikigita en *JORF*, 8-11-1945, p. 7401 (kaj vidu ĉe: [lemonde.fr/archives/article/1945/11/10/information-diverses\\_1864541\\_1819218.html](http://lemonde.fr/archives/article/1945/11/10/information-diverses_1864541_1819218.html)).

<sup>29</sup> [trainconsultant.com/2019/07/24/le-transsaharien-encore-un-mauvais-reve-colonial-ou-peut-etre-la-grande-chance-dune-afrique-qui-en-avait-besoin](http://trainconsultant.com/2019/07/24/le-transsaharien-encore-un-mauvais-reve-colonial-ou-peut-etre-la-grande-chance-dune-afrique-qui-en-avait-besoin). (Kaj en 1950 R. CLAUDON estis nomumita vic-prezidanto de la SNCF (franca Nacia Societo de la Fer-Vojoj). (M. PÉLISSONIER, "Nécrologie: M. René Claudon, Inspecteur Général des Ponts et Chaussées", en *Bulletin du P.C.M.*, LV<sup>e</sup> année, Série C, n° 5, majo 1958, p. 7.)

<sup>30</sup> "TARRY Harold Honoré Félix", en *Dictionnaire historique des inspecteurs des Finances 1801-2009*, sub la dir. de Fabien CARDONI, Nathalie CARRÉ DE MALBERG, kaj Michel MARGAIRAZ, Vincennes, 2012, p. 941.

En 1894 li mallonge parolis ĉe parizaj kunsidoj de la Astronomia Societo de Francio (kies membro li fariĝis en 1891)<sup>31</sup>, unue kiel "inspektisto de la telegrafaj lineoj"<sup>32</sup>, kaj, la sekvan monaton, kiel "arkivisto ĉe la Politeknika Lernejo"<sup>33</sup> (kies adreso fariĝos lia ĝis 1901, almenaŭ por priscienca korespondado)<sup>34</sup>. Li poste revenis en Alĝerion, ĉi-foje en vilaĝeto de la kabilia marbordo (Tigzirt, cent kilometrojn oriente de Alĝero). Li lanĉis en 1895 franc-lingvan semajnan gazeton, kies kvin restantaj numeroj eble estis la solaj fakte aperintaj, kun kampanjo kontraŭ malversacioj. Sed li estis kondamnata en decembro de la sama jaro pro kalumnio<sup>35</sup>, kaj eble tial li ĉesis aperigi sian gazeteton<sup>36</sup>.

En 1901, ankoraŭ loĝanta en Tigzirt, li decidigis la direktoron de ĝis tiam nura sekcio astronomia de pli ampleksa alĝera asocio (*l'Athénée d'Alger*), sendependigi ĝin, kaj li tiel povis nomi sin fondinto de la *Société scientifique<sup>37</sup> Flammarion d'Alger et de l'Afrique française<sup>38</sup>*, kun sidejo ĉe la alĝera urbodomo. Li preskaŭ tuj fariĝis ĉefredaktoro de ĝia bulteno *Uranie*, kiun li anoncis duonmonata<sup>39</sup> sed kies kvar unuaj numeroj eble estis, denove, la solaj kiuj entute ekzistis<sup>40</sup>. Tio ne malebligis ke post du jaroj li fariĝis, almenaŭ laŭ sia propra deklaro, prezidanto (kaj do eĉ prezidanto-fondinto) de tiu nova asocio. Nun li ekrestadis en la vilao *Aldébaran*, apud la vilao *Uranie* kie loĝis la barono DE CHÉON, ankoraŭ prezidanto de la asocio, ambaŭ sur la altaĵoj de Bouzareah (ĉirkaŭurbo de Alĝero), ne for de la observatorio.

## Brila ekagado por la lingvo

Sed tiam, anstataŭ perdiĝi inter la steloj (tria vilao nomiĝis *Bételgeuse*, t.e. Betelĝuzo en Esperanto) aŭ malkovri novan konstelacion, TARRY malkovris... nian lingvon. Plej verŝajne dank'al leŭtenanto MOUGENOT, sekretario de la Geografia Societo de Alĝero kaj Nord-Afriko en kiu, membro ekde januaro 1880<sup>41</sup>, TARRY tiam aktivis: TARRY preskaŭ certe ĉeestis kiam, en marto 1903, F. MOUGENOT prelegis pri Esperanto en kunsido de tiu asocio.<sup>42</sup> (Sed li eble aŭdis pri ĝi eĉ antaŭe, aŭ de li, aŭ de A. RIVIER kiu estis E-Delegito en la jaro 1901-1902<sup>43</sup>.)

<sup>31</sup> Laŭ la "Liste Générale des Membres de la Société Astronomique de France au 31 Décembre 1912", en *L'Astronomie*, vol. 26, p. 675 (ĉe: adsabs.harvard.edu/full/1912LAAstr..26..611 [tiele]).

<sup>32</sup> "Inspecteur des lignes télégraphiques" ("Société astronomique de France [SAF], Séance du 2 Mai 1894: Communications verbales", en *L'Astronomie (...)* publiée par Camille Flammarion, 13<sup>e</sup> année, 1894, p. 231.)

<sup>33</sup> "Archiviste à l'École Polytechnique" ("SAF, Séance du 6 Juin 1894", en *L'Astronomie*, 1894, p. 270.

<sup>34</sup> "1891 Tarry (H.), inspecteur des Finances, en retraite, 21, rue Descartes, Paris, (389)." ("Liste générale des Membres de la Société Astronomique de France au 31 Décembre 1900", en *Bulletin de la Société Astronomique de France et Revue Mensuelle d'Astronomie, de Météorologie et de Physique du Globe*, vol. 14, p. 608.)

<sup>35</sup> [www2.culture.gouv.fr/LH/LH266/PG/FRDAFAN83\\_OL2569066V003.htm](http://www2.culture.gouv.fr/LH/LH266/PG/FRDAFAN83_OL2569066V003.htm).

<sup>36</sup> Laŭ la nuntempa ĵurnalisto Mohamed AREZKI HÏMEUR, ĝia eldonkvanto estis nur "kelkaj dekoj da ekzempleroj" ("Histoire de la presse en Algérie", en *Djiri Magazine* (Alger), majo 2011; reproduktita ĉe focus-algerie.blogg.org/histoire-de-la-presse-en-algerie-du-bras-ecrit-de-la-colonisation-a-fa-a116340542. Sed eble la aŭtoro de la studo iomete malgravigis la realaĵon pro malestimemo.

<sup>37</sup> La ajektivito *scienca* fakte estis nura porokaza aldono lia.

<sup>38</sup> H. TARRY, Inspecteur des finances en retraite, "Nouvelles de la science, variétés: Société scientifique Flammarion d'Alger et de l'Afrique française", en *Bulletin de la Société Astronomique de France...*, vol. 15, p. 198.

<sup>39</sup> Samloke.

<sup>40</sup> Unua numero aperis en sept. 1901. Ĉe la Francia Nacia Biblioteko, troviĝas nur la 1-4 de tiu unua jaro 1901.

<sup>41</sup> "Admission de M. Tarry Harold". ("Extraits des procès-verbaux: Séance du 22 janvier 1880", en *Africa: Bulletin de la Société de géographie d'Alger*, 1<sup>ère</sup> année, 1880, p. [127].

<sup>42</sup> TARRY parolis en kunsidoj de tiu asocio, la 13-an, 15-an, 22-an, kaj 27-an de januaro 1903 (respektive p. 56, 62, 38, et 57), pri konservado de la historiaj monumentoj, kaj fariĝis prezidanto de komisiono pri tio, kiu verkis dezirespimon; kaj pri la kunsido kiu okazis la 5-an de marto, protokolo indikas: "La deziresprimo pri konservado de la Historiaj Monumentoj estis transdonata al Komitato (...). La parolo estis poste donata al s-ro Leŭtenanto Mougénot, kiu faris komunikadon pri Esperanto, racia, universala lingvo (...)"\* Do la tiam ĉeesto de la komisiono-prezidanto estas plejverŝajna. \*("Séance du 5 mars 1903", en *Bulletin de la Société de géographie d'Alger et de l'Afrique du Nord*, p. LXIX, ĉe: gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k106540r/f71.)

<sup>43</sup> Heidi GOES, *Afero de espero: Konkiza historio de la Esperanto-movado en Afriko*, Rotterdam: UEA, 2007, p. 16.

En 1903 TARRY varbis "adeptojn"<sup>44</sup>, kaj kiam la alveninta Kapitano CAPÉ atingis ke, la 18-an de oktobro, la generalo komandanta la 19-an korpuson en Alĝero konsentis plusendi lian peton "partopreni en la propagando farita en Francio favore al la universala helpa lingvo Esperanto", eĉ sen atendi la respondon, jam du tagojn poste, la 20-an de oktobro, ili fondis la Grupon de Alger kaj de Nord-Afriko, kun 43 fondintaj membroj<sup>45</sup>, kaj, post ses-semajna varbkampanjo, 112 membroj (la 7-an de decembro), inter kiuj, plej verŝajne varbitaj de TARRY, la prefekto<sup>46</sup> kaj la urbestro de Alĝero<sup>47</sup>, kiuj fariĝis membroj de ties patrona komitato<sup>48</sup>. Post prelego de CAPÉ antaŭ preskaŭ 400 homoj la 18-an de decembro, la 6-an de januaro 1904 estis 182 membroj<sup>49</sup>, 233 membroj la 6-an de februaro, kaj la 8-an de marto 283<sup>50</sup>!

TARRY jam antaŭvidis sin kaj *iu* diris lin prezidanto ("aklame elektita")<sup>51</sup>, sed la revuo *L'Espérantiste* devis korekti en januaro la *anoniman* eraran informon (do eble ne de TARRY?): oficiale la posteno ankoraŭ vakis<sup>52</sup>. Kaj en la listo de la plena komitato, finfine elektita dum la unua ĝenerala kunveno en marto 1904, inter la naŭ nomoj *ne* aperas tiu de TARRY.<sup>53</sup>

Lia nura ebla influo, kvankam la verda stelo delonge estis unu el la simboloj de Esperanto kaj kvankam ĉi-foje li ne fariĝis ties redaktoro, koncernas la nomon de, laŭ ties franc-lingva subtitolo, la "malgranda organo de esperantista propagando de Nord-Afriko": *La Algérie Stelo*. Laŭ nia kono temis, en februaro 1905 (kun lasta numero en septembro 1906), pri la unua el iomete pli ol cent Esperantaj gazetoj en kies titolo troviĝas la vorto *stelo*<sup>54</sup>, certe speciale kara por nia amatora astronomo, kies adreso denove estis en Parizo ekde aprilo 1905.

### Akcia anonima Societo "Esperanto-Ĵurnalo"

Sed nun, kun Paul BERTHELOT, kiu fondis *Esperanto*, "Propagandan ĵurnalon por la lingvo helpa internacia" en junio 1905 en Céret, urbeto de la franca parto de Katalunjo, ni tuj transiru de Francio al Svislando kie, post lasta numero (19) presita en Céret kaj datita 25-an de februaro 1906, BERTHELOT volis relanĉi ĝin en Ĝenevo okaze de la dua Universala Kongreso. Li atingis en junio ke SES (Svisa Esperanto Societo) donos "al ĉiuj SES-anoj kiuj enskribos sin por la Kongreso antaŭ la 10<sup>a</sup> de Augusto, 4 unuajn numerojn de l'gazeto 'Esperanto Journal' kiu publikigos oficialajn sciigojn pri la kongreso."<sup>55</sup>

La 22-an de julio 1906 okazis "la unua kunveno de l'akciuloj de Esperanto-ĵurnalo", kaj "la statutoj de anonima Societo de Esperanto-ĵurnalo estis rajtigitaj". BERTHELOT estis

<sup>44</sup> "La Grupo de Alger [tiele] kaj Nord-Afriko", en *L'Espérantiste*, 6<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 72, 31-12-1903, p. 325.

<sup>45</sup> "Grupo de Alĝero [tiele] kaj Nord-Afriko", en *L'Espérantiste*, 7<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 73, 31-1-1904, p. 13.

<sup>46</sup> TARRY havis "konatojn ĉe la prefektejo de Alĝero" (F. SOULU, citita verko, p. 266).

<sup>47</sup> Tiu ĉi ([Frédéric Jacques] ALTAIRAC)\* disponigis por Esperanto-kursoj la ĉambregon de la urbodomo\*\*, kie la *Société Flammarion*, tiam prezidata de TARRY, jam havis sian sidejon.

\* Laŭ la listo "Approbateurs" (Aprobantoj), en *L'Espérantiste*, 7<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 75, 31-3-1904, p. 46.

\*\* *La Vigie Algérienne* n<sup>o</sup> 10.004, 12-12-1903, p.[2].

<sup>48</sup> "Grupo de Alĝero kaj de Nord-Afriko", en *L'Espérantiste*, 7<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 75, 31-3-1904, p. 54.

<sup>49</sup> "Grupo de Alĝero kaj Nord-Afriko", en *L'Espérantiste*, 7<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 73, 31-1-1904, p. 13.

<sup>50</sup> "Grupo de Alĝero kaj de Nord-Afriko", en *L'Espérantiste*, 7<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 75, 31-3-1904, p. 53.

<sup>51</sup> "La Grupo de Alger kaj Nord-Afriko", en *L'Espérantiste*, 6<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 72, 31-12-1903, p. 326.

<sup>52</sup> "Grupo de Alĝero kaj Nord-Afriko", en *L'Espérantiste*, 7<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 73, 31-1-1904, p. 12. Ĉe la fonda kunveno CAPÉ estis elektita nur provizora ĝenerala sekretario ĉar por fariĝi prezidanto li devis atendi pozitivan respondon el Parizo, verŝajne donitan ĉ. la 12-a de novembro, dato de la subskribo de pli ĝenerala permeso per ministreja cirkulero. (Unua ministreja cirkulero, la 12-an de novembro, publikigita en *Bulletin Officiel du Ministère de la Guerre*, Partie réglementaire, n<sup>o</sup> 44, 23 nov. 1903.)

<sup>53</sup> "Grupo de Alger kaj Nord-Afriko", en *L'Espérantiste*, 7<sup>a</sup> jaro, n<sup>o</sup> 76, 30-4-1904, p. 72.

<sup>54</sup> Aŭ pli ekzakte la radiko *stel* enestas en ĉ. 102 titoloj, ĉar ankaŭ troviĝas "verdstela", "stelaro", "sepstela"... Kaj mi ne enkalkulis 103-an titolon kun la samsignifa vorto "Kvinpinto". (Vd listojn en Ch. LAVARENNE, *Espéranto: Son idée interne dans ses origines et quelques-unes de ses expressions et manifestations (aide ou obstacle à la diffusion de la langue?)*, doktora disertaĵo defendita ĉe Paris 13 - Sorbonne Paris Cité, la 4-7-2012, p.1353-1356.

<sup>55</sup> "Pri la Kongreso", en *Svisa Espero* IV, 6, junio 1906, anonco sur la nenumerita paĝo sekvanta la p. 44.

elektita kiel delegito-administranto de l' ĵurnalo, kun precizigo ke "neniu prenos la titolon de ĉefredaktoro"<sup>56</sup>, kaj li estis nomumita de la administra Konsilantaro kasisto de la akcia societo.<sup>57</sup>

Hector HODLER ne estis membro de la administra Konsilantaro de la nova societo. Sed, la sekvan semajnon, granda francelingva artikolo de li aperis en la unua Ĝeneva numero de *Esperanto*, varme invitanta la esperantistojn al la Kongreso<sup>58</sup>, ĉar li estis sekretario de ties Loka Organiza Komitato kun Edmond PRIVAT. Li eĉ estis, pli precize, komisiita al la gazetaro<sup>59</sup>, kaj do rapide kunlaboris kun BERTHELOT.

En la febro antaŭ kaj dum la Universala Kongreso (kun 818 patroprenantoj)<sup>60</sup>, en la sola monato aŭgusto aperis ne malpli ol sep numeroj de *Esperanto*, kiu fariĝis la "ĵurnalo oficiala de l' kongreso, aĉetebla en ĉiuj ĵurnalvendejoj kaj stacidomoj"<sup>61</sup>; sed la 1-an de septembro, eĉ antaŭ ol la kongreso estis tute finita, Paul BERTHELOT anoncis ke "pro gravaj kaŭzoj, estas al li neeble resti en la postenon [tiele] kiun li ĝis nun okupas en la Societo"<sup>62</sup>. La 16-an de septembro, BERTHELOT prezentis la kalkulojn de sia administrado, "trovitajn ĝustaj de la kontrolistoj", la tagon mem de la apero de la lasta numero de li, ĉar li estis "forironta post kelkaj tagoj, taskita per esperantista misio en Sud-Ameriko"<sup>63</sup>. (Kaj la 30-an de septembro li estis efektive foririnta ĉar il sendis de Marsejlo unuan poŝtkarton al Hector, kaj poste alian el Hispanio, la 1-an de oktobro.)<sup>64</sup>

Sed ni revenu al tiu 16-a de septembro 1906. Je la 11-a horo, ĉar BERTHELOT deklaris konfirmi sian ekŝigon, la du akciuloj taskitaj kiel kontrolistoj "telegrafis al S-ro H. Tarry, je kies sindonemo kaj bonvolo ili sciis ke ili povas kalkuli, por transdoni al li la povon de provizora Administranto kaj peti lin ke li aperigu la venontajn numerojn"<sup>65</sup>. Jen do finfine la nomo de la aludito en jena ununura frazo pri li: "S-ro Berthelot (...) aŭ ebla posteulo vendis la gazeton, post ŝajne malbonaj spertoj, al Hodler."<sup>66</sup> Kaj TARRY, alveninte la saman tagon,

"deklaras akcepti la funkcion de provizora Administranto (...); li ankaŭ akceptas, kun benefico de inventaro, la financon (...), kaj donas kvitancon al la ekŝiganta Administranto pri la kasa saldo; kontraŭ kio li devontigas sin realigi la n-rojn 29 kaj 30 de la gazeto en kiel eble plej mallonga tempo."<sup>67</sup>

<sup>56</sup> "Societo 'Esperanto-Ĵurnalo'", en *Esperanto: Esperanto-Journal & Revue de l'Esperanto*, Dua jaro, N° 20, Dimanĉo 29 julio 1906, p. [2]; la projekto plej probable aperis en [suplemento de la] n-ro [1]9, sub la titolo "Anonima Akcia Societo por ekspluatado de nia gazeto": "La kapitalo estos komence 5000 frankoj, dividata en 200 akcioj da 25 Fr, pageblaj ĉu en unu ĉu en pli ol unu fojoj. Fiksa rentumo da [tiele] 4 procentoj estos ĉiujare pagataj al la akciuloj (...)" (citita en E. STETTLER, *cit. verko*, p. 21).

<sup>57</sup> "Société anonyme par actions 'Esperanto-Journal': Comité d'administration", en *Esperanto: Esperanto-Journal & Revue de l'Esperanto*, Seconde année, N° 20, Dimanche 29 juillet 1906, p. [2].

<sup>58</sup> "Partie non officielle: A Genève!", en *Esperanto...*, Seconde année, N° 20, Dimanche 29 juillet 1906, p. [2].

<sup>59</sup> Tio aperas ekz-e en: La ĝenerala sekretario Edmond PRIVAT, La sekr. komisiita al la gazetaro H. HODLER, "Dua Universala Kongreso de Esperantistoj, Genevo [tiele], 28<sup>an</sup> de Aŭgusto – 6<sup>an</sup> de Septembro 1906: Unua Cirkulero de l' Loka Organiza Komitato", en: *Svisa Espero*, IV<sup>a</sup> Jaro, N<sup>roj</sup> 4 kaj 5, Aprilo kaj Majo 1906, p. [25]-26.

<sup>60</sup> *Enc. de Esp.*, p. 187); "les 800 congressistes" ("La fin du Congrès", en *Esperanto*, Seconde année, n° 28, Dimanche 16 Septembre 1906, p. [1b]); "818 kongresanoj" ("Universalaj kongresoj", en *Jarlibro de la Esperanto-Movado: 1939-1940*, Genève: UEA, [s.d.], p. 11).

<sup>61</sup> "Avizo grava", en *Svisa Espero* IV, 7/8, julio-aŭgusto 1906, p. 47.

<sup>62</sup> "Esperanto-Ĵurnalo [tiele]: Anonima Akcia Societo", en *Esperanto...*, Dua Jaro, N° 28, Dimanĉo 16 Septebro [tiele] 1906, p. 3b, kaj sama artikolo en *Esperanto*, Seconde année, N° 28 bis, Dimanche 23 Septembre 1906, p. [5b].

<sup>63</sup> "Procès-verbal", en *Esperanto*, Seconde année, N° 28 bis, Dimanche 23 Septembre 1906, p. [1a]. (Mia trad.)

<sup>64</sup> AJB, HH-1020-0309; kaj HH-1020-0311, preskaŭ certe de Valencio, kies foto estas reproduktita sur ĝi.

<sup>65</sup> "Procès-verbal", en *Esperanto*, Seconde année, N° 28 bis, Dimanche 23 Septembre 1906, p. [1a]. (Mia trad.)

<sup>66</sup> Edouard STETTLER, *Hector Hodler: Lia vivo kaj lia verko 1887-1920*, Genève: UEA (Eldona Servo), 1928, p. 21; ĉe digital.onb.ac.at/RepViewer/viewer.faces?doc=DTL\_7472396 [vidaĵo: 28].

<sup>67</sup> "Procès-verbal", en *Esperanto*, Seconde année, N° 28 bis, Dimanche 23 Septembre 1906, p. [1a]. (Mia trad.)

"Konforme al la [ĵus citita] protokolo (...) S-ro Berthelot (...) transdonis la funkciadon de la gazeto al sia posteulo [TARRY]. Tiu transdono daŭris de du tagoj kaj minacis fariĝi senfina kiam, tre bonŝance, S-ro Cart, vicprezidanto de la SFPE [Societo franca por la propagando de Esperanto]<sup>68</sup>, kaj S-ro René de Saussure, de la esperantista grupo de Ĝenevo, intervenis, la merkredon 19-an de julio [tiela eraro, fakte: septembro] kaj ĉeestis, de la 3-a ĝis 6-a horo, ĉe la inventarado de la materialo, konstatantaj ke S-ro Berthelot transdonis ĉiujn arkivaĵojn al S-ro Tarry."<sup>69</sup>

Tio gravas, pro postaj polemikoj, ĉar tio aperis en unu el la numeroj pri kiuj TARRY respondecis, do plej verŝajne li mem konsentis ke finfine ĉio estas en ordo.

### Harold TARRY posteulo de Paul BERTHELOT

Do, ĉu la krizo pro la subita ekŝiĝo de BERTHELOT estis solvita? Tute male, tio estis nur la komenco de la problemoj, ĉar jam en jena tuj sekva frazo TARRY mem klare konfesis ke *ne* laŭregule li enposteniĝis:

"Jam ekde la 19-a de septembro, S-ro Tarry do prenis, sen esti delegita de kiu ajn pro la urĝeco, la funkcion de administranto kaj de ĉefredaktoro (...)"

(Nu, ni memoru ke, malpli ol du monatojn antaŭe estis *voĉdonita* ke "neniu prenos la titolon de ĉefredaktoro".)<sup>70</sup> Do fakte temis pri ia puĉo, sekve de peto de nur du akciuloj, kaj *eble* kun la konsento de du pliaj se, kiel verŝajnas, ankaŭ CART kaj DE SAUSSURE estis akciuloj.

Sed kial "ĉefredaktoro *nur por la franca parto*" kiel li tuj sekve precizigis eĉ emfaze per kursivaj literoj?

Laŭ la tiam ankoraŭ netute 19-jara HODLER, eble iom troigema, tutsimple "ĉar li ne konas Esperanton"<sup>71</sup>; sed ĉiukaze tio estas kohera kun du strangaj indikoj ne multe antaŭaj: apenaŭ tri monatojn antaŭ li (aŭ alia) erare diris sin (aŭ lin) prezidanto de la Grupo de Alger kaj de Nord-Afriko, lia nomo troviĝas inter la kandidatoj, en listo publikigita en julio 1903 (antaŭ aŭtomata konfirmo krom kaze de kontraŭstaro) por fariĝi ne "adepto" de la SFPE, t.e. membro scianta aŭ lernanta la lingvon, sed nura aprobanto. Kaj ankoraŭ en aprilo 1905,

---

<sup>68</sup> La franco Théophile CART (1855-1931), kvankam nakiĝinta en Francio (en departemento Dordogne), studis ĉe baz- kaj mez-lernejoj en Laŭzano, kie li ankaŭ prezentis sian doktoran disertacion (pri GOETHE)\* kaj kie, ekzemple, li pasigis unu monaton da feriado en septembro 1902\*\*. Li partoprenis en la fonda kunveno de Svisa Esperanto Societo (la 27-9-1903 en Rolle). Do preskaŭ certe, dekkvinon da tagoj post la kongreso, en kiu li partoprenis, li ankoraŭ estis en Svislando (kie, ĉiukaze li ankoraŭ prelegis la sekvantan semajnon)\*\*\*. CART estis vokita kiel paciganto inter la verŝajne tro zorgema kaj skrupula pri laŭleĝeco S-ro TARRY kaj la anarkiisto BERTHELOT kiu, ekzemple, parolis la unua ĉe la "Ĝenerala Kunveno de la 'Ruĝuloj' Esperantistaj", la 2-an de septembro\*\*\*\* okaze, sed *ne* enkadre, de la kongreso. Oni turnis sin al CART verŝajne ĉar li bone rilatis, almenaŭ profesie, kun BERTHELOT: ilia kunlaborado atingis grandan sukceson ĉar ankoraŭ estis aperonta ĉe Hachette kvina eldono (26-a milo) de ilia *Vocabulaire Français-Esperanto*. \*catalogue.bnf.fr/ark:/12148/cb319113788.

\*\* "La komencoj", en Joseph KREITZ, *Historio de la Esperanto-movado inter la blinduloj*, vol. I, Barcelona: EBLOGo (Esperanto-Blindulligo de Germanujo) por LIBE, 1972; ĉe libe.slikom.info/Historio de la Esperanto-Movado Inter la Blinduloj/Historio de la Esperanto 2017.htm#z007 (konsultita la 25-1-2020).

\*\*\* "Geneva esperantista grupo", en *Svisa Espero* IV, 11, novembre 1906, p. 79: "Je la okazo de la sekvanta semajna kunveno de nia grupo", post: "la 20an Sept. (...) publika konferenco" (de iu alia.).

\*\*\*\* Fi-Blan-Go [pseŭdonimo de Fernand BLANGARIN], "Ĝenerala Kunveno de la 'Ruĝuloj' Esperantistaj: Okazinta en Genevo [tiele] la 2-an de Septembro 1906" (kie BERTHELOT estas menciita sub sia pseŭdonimo Verema), ĉe la 3-a paĝo de la parto en esperanto de *Esperanto* N° 28, Dimanĉo 16 Septe[m]bro 1906.

<sup>69</sup> Franclingva komento sekvanta la "Procès-verbal", en *Esperanto*, N° 28 bis, Dimanche 23 Septembre 1906, p. [1 b]. (Mia trad.)

<sup>70</sup> "Societo 'Esperanto-Ĵurnalo'", en *Esperanto*, N° 20, Dimanĉo 29 julio 1906, p.[2]; la projekto probable aperis en [suplemento de la] n-ro [1]9, sub titolo "Anonima Akcia Societo por ekspluatado de nia gazeto": "La kapitalo estos komence 5000 frankoj, dividata en 200 akcioj da 25 Fr, pageblaj ĉu en unu ĉu en pli ol unu fojoj. Fiksa rentumo da [tiele] 4 procentoj estos ĉiujare pagataj al la akciuloj (...)" (citita en E. STETTLER, *cit. verko*, p. 21).

<sup>71</sup> En malneto aŭ nefinita letero al iu por ni anonima "Kara Samideano", datita je 17-10-1906 (HH-1020-0587).

anstataŭ aperi sub la rubriko "Adresoj ŝanĝitaj", li denove troviĝas sur simila listo (de tuj fariĝontaj aprobantaj membroj), ĉi-foje en Parizo (rue de Bagneux). Ĉu tiam li ankoraŭ ne eklernis la lingvon? Almenaŭ li ne multe regis ĝin, laŭ rimarko de pastoro Friedrich SCHNEEBERGER, unu el la membroj de la administra Konsilantaro de la anonima akcia societo (kaj prezidanto de Svisa Esperanto Societo): "Mi jam ricevis kelkajn leterojn de s-ro Tarry, kiujn mi preskaŭ [tiele] ne povas legi (...)"<sup>72</sup> Sed ankaŭ eblas ke SCHNEEBERGER esprimis per tiuj vortoj lian preskaŭ nekapablon kompreni lian *skribon* kiun, eĉ en la franca, francoj havas fojfoje kelkan penon deĉifri; skribo kiu cetere povas esti indico de psikaj perturboj: HODLER parolis pri "lia speciala cerbo", kaj TARRY mem skribis al li:

"Se diri la veron, la embarasoj kiujn vi kaŭzis al mi, kaj trostreĉado, igis min malsana en Collonges[-au-Mont-d'Or apud Lyon], la cerba anemio kiu konstante minacas min, denove venkis kaj dum 8 monatoj mi malaperis el la medio, enfermita kiel homa ruino en mia soleca ĉambro de la strato Bagneux [en Parizo]."<sup>73</sup>  
(Li tiam estis 69-jara.)

Kaj per tio ni eniras en pli subjektivajn vidpunktojn, ekzemple tiun de Hector skribanta, nur *duonŝerce* malgraŭ la stilo malkaŝe hiperbola (do ja tute troiga), al iu "kara Samideano" kiu estas lia kamarado Paul BERTHELOT laŭ la enhavo de la letero. Jen ĝia komenco:

"Se mi ne skribis al vi pli frue, tio estas tute pro via kulpo – pro via kulpo, ĉar vi, post via foriro, lasis en Genevo [tiele] duan, pli teruran ol la antaŭa, frenezulon, kiun ni povis forpeli nur post sennombraj aventuroj, kaj rakontindaj – kvankam neniam rakontotaj – okazoj. Tiu-ĉi terurulo havas nomon Tarry, kaj li certe estas pli freneza ol ĉiuj ĝisnunaj esperantistoj kunligitaj. Rakonti ĉion kion ni (kaj ĉefe mi) suferis estus io tro longa."<sup>74</sup>

(La antaŭa frenezulo aludita estis lia korespondanto mem, BERTHELOT, unua redaktoro de la gazeto, do Hector kaptis la okazon por ja ŝerce inciteti lin.)

BERTHELOT respondis pri tiu punkto, sufiĉe serioze:

"Kiam mi transdonis la ĵurnalon al Tarry [do la 16-an de septembro 1906], li ne ŝajnis tiel freneza. Lia unua atako komenc[i]gis nur kelkaj[n] tagoj[n] poste, kiam mi nenion plu povis fari kaj devis voki Cart kaj de Saussure [do la 19-an]. Tion certigus sendube S[-]rino Rieder (...)"<sup>75</sup>

Antaŭe BERTHELOT, aŭ iu alia, metis TARRY, kiu ne plus memoras tre precize, en rilato kun HODLER, verŝajne jam kun la ideo ke tiu ĉi povus meti en la servon de la gazeto siajn kapablojn, i.a. lingvan. Sed ni nun lasu Harold TARRY longe prezenti alian interpretadon de la okazintaĵoj. ~~[eventuala ilustraĵo ĉi tie: leterkomenco]~~ Post bedaŭrinda komenca miskompreno,

"niaj rilatoj poste estis plej koraj. Ĉar vi prenis plezuron veni al mia librovendejo [esperantista, kiun li ĵus malfermis en Genevo], kun S-ro de Saussure, kies [kvazaŭ] ombro vi estis kaj kiun mi rigardis, laŭ la politeknika kutimo, kiel 'karan kamaradon', mi diris al vi: 'Rigardu kvazaŭ propran hejmon mian librovendejon, kies dungitaron oni vidas sen malagrabla sento [verŝajne aludo al Fraŭlino RIEDER, menciita en la letero de BERTHELOT], faru tie vian korespondadon, uzu unu ŝrankon por deponi en ĝi vian arkivon kaj faru el tiu *Oficejo esperanta*<sup>76</sup> ankaŭ vian oficejon, de Saussure kaj vi.' Mi enkondukis lupon en ŝafejon. – Ĝi forportis mian ŝafidon! [komprenu: la gazeton] Dum pli ol unu monato vi profitis de mia gastigo, kaj mi estis feliĉa esti kreinta en Genevo *esperantistan centron*<sup>77</sup>. (...)

Devante fari la numeron 29 de la gazeto Esperanto, mi invitas vin kunlabori pri ĝi kun mi: vi akceptas la titolon *ĉefredaktoro de la esperanta parto* (...) Mi inicas vin pri la kuirarto de mia gazeto, kun kies meĥanismo vi konatiĝas, tiel ke vi povu ĝin redakti kaj presigi sola, kaj vi kunlaboras pri la n-ro 29 kun vera sindonemo pri kiu mi ne povus sufiĉe danki vin. Tio estis la kora entento."

<sup>72</sup> Tajpita letero al H. HODLER, datita de Laufon, 16-10-1906 (AJB, HH-1020-0362).

<sup>73</sup> Letero de Harold TARRY al H. HODLER, 25-an de novembro 1907, p.[4] (AJB, HH-1020-0420).

<sup>74</sup> Letero de H. HODLER al [P. BERTHELOT], 9-2-1907 (HH-1020-0589), p.1; transskribo de Mario BÉLISLE.

<sup>75</sup> Letero de Paul BERTHELOT al Hector HODLER, marto 1907 (AJB, HH-1020-0398).

<sup>76</sup> La du vortoj kursivigitaj de mi estas en Esperanto en la originalo.

<sup>77</sup> La du vortoj kursivigitaj de mi estas substrekitaj en la manuskripta originalo.

(Per la lasta esprimo TARRY aludis al la historia interkonsento inter Francio kaj Britio en 1904 kaj la amikiĝo kiu kreskis inter la du popoloj.)

Poste venis la periodo de la kriza rilato (*rappports tendus*: laŭvorte streĉitaj rilatoj): konfliktoj i.a. pri povo, sed ankaŭ pri la ŝuldoj kiuj kreskis ĉe la presisto. Sed detalado pri ĉio ĉi rapide fariĝus teda. Do jen nur unu ekzemplo. Kion TARRY aŭdacis – represigi la lastan numeron de BERTHELOT iomete cenzurante ĝin: "La nova Administranto (...) ĉi tie forigas senutilan paragrafon (...)"<sup>78</sup> – , li siavice suferis similaĵojn faritajn de HODLER :

"Dum unu foresto mia (...) vi fermas la numeron, sen konsulti min, fortranĉante artikolon en du lingvoj kiun mi jam kompostigis por montri ke mi havas alian vidpunkton ol Berhtelot, kion mi necedeme volis; vi enmetas anoncojn aliajn ol tiuj kiujn mi preparis (...)"<sup>79</sup>

Kaj tamen HODLER povintus (aŭ eĉ devintus) forigi ankoraŭ aliajn liniojn, sufiĉe kompromitantajn (des pli ĉar franclingvajn) pro la megalomanio kiun ili malkaŝas, kaj kiu riskis – malgraŭ la mencio "L'Administrantaro de l'ĵurnalo lasas al ĉiu aŭtoro de artikolo la respondecon de lia skribaĵo" – malfidigi la legantojn pri la esperantistaro, kredante ke temas pri komuna deziro anstataŭ nura persona revo de la sola TARRY. Jen ĝi:

"Tiel estus, en ĉiu ŝtato el la kvin partoj de la mondo, Ĝenerala Konsulo, kiu poste povos esti oficiale kaj diplomatie akreditata apud la registaroj por reprezenti la Esperanto Imperion (...)"<sup>80</sup>

Kaj la erara impresio ke temis pri pli ĝenerala opinio ol tiu de nur unu unuopulo povis esti kvazaŭ konfirmita per alia, *ne subskribita* artikolo, kiu sukcesis (almenaŭ laŭ ĉi ties fina konkludo en simila stilo), "pruvi per nerefutebla statistiko ke Esperanto grandpaŝe marŝas al la konkero de la mondo..."<sup>81</sup>

Tiu artikolo aperis en la lasta numero redaktita kaj presigita de TARRY. (Kaj sur tiu *rara* n-ro 30, strange ĉar li eldonis ĝin apud Lyon (en Collonges), li aldonis kiel plian subtitolon: *La Algeria Stelo*; do tiel li nun intencis samtempe ankaŭ daŭrigi la gazeton de la grupo kies prezidanto li ne sukcesis fariĝi kvankam pri tio li revis. Ŝajnas ke li denove perdiĝis en siaj revoj.)

## Konkludo

Kial la historiistoj de la movado silentis pri Harold TARRY? Nu, ja li redaktis nur du numerojn, aŭ kvar laŭ li – ĉar li do plej verŝajne enkalkulis la n-ron 28 *bis* (en la franca kun cenzurita represo de la Esperanta parto de la lasta numero de BERTHELOT), kaj iun unuan eldonon, eble do diferencon, de la n-ro 30, kies nur duan eldonon oni retrovis.

Sed, plie de liaj longaj kaj akraj polemikoj kun HODLER, verŝajne la ĉefa kaŭzo kiu igis TARRY tabua temo ĉe la esperantistoj, estas ke, laŭ (senreferenca) indiko de d-ro André VÉDRINE, la historiisto de la Esperanto-movado en la Liona regiono, li tuj transiris al la idista movado ekde ties naskiĝo.<sup>82</sup> Fakte tio ne estas tute ekzakta ĉar male, en la marĝeno de la lasta paĝo de la lasta letero, nun konita de ni, kiun li skribis al HODLER la 25-an de novembro 1907,

<sup>78</sup> Ironia artikoleto (la fakte *du*-paragrafa "Malavara dankinda donacinto!"), kies provoko cetere ja ne tre taŭgis (des pli ke la donacinto estas nomita), en la originala n° 18, 16-9-06, p. 3b ([aea.esperanto.org.au/ftp-uploads/E-060916.pdf](http://aea.esperanto.org.au/ftp-uploads/E-060916.pdf)). Ĝia anstataŭaĵo legeblas en n° 18 *bis*, 23-9-06 ([aea.esperanto.org.au/ftp-uploads/E-060923.pdf](http://aea.esperanto.org.au/ftp-uploads/E-060923.pdf)).

<sup>79</sup> Letero de Harold TARRY al Hector HODLER, 25-an de novembro 1907, p. [2] (AJB, HH-1020-0420).

<sup>80</sup> "Lettre de M. H. TARRY (...) à M. le Président du second Congrès universel d'Espéranto", 30 août 1906, en *Esperanto*, N° 29, 30-9-1906, p. [2b]. (Mia trad.)

<sup>81</sup> *Esperanto: Esperanto-Journal – Revue de l'Espéranto – La Algeria [sic] Stelo* (Collonges-au-Mont-d'Or, Impr. A. Storck, Lyon), Seconde Année, N° 30 (2<sup>me</sup> Édition), Dimanche 28 Octobre 1906, p. [4]. Malkovrita de André VÉDRINE ĉe Archives départementales du Rhône ("Pri la gazeto 'Espéranto'", en *Monata Cirkulero de KCE* n° 130, sept. 1981, p. 2); kun mia danko al Marielle GIRAUD, pro la sendo de ekzemplero en pdf-formato.

<sup>82</sup> André VÉDRINE, *Cent ans d'Espéranto en Saône et Loire* [tiele] *et dans la région Rhône-Alpes 1895-1995: En collaboration avec Ida VÉDRINE*, Lyon: Auto-édition, 1996, p. 51 (p.77 ĉe: [deltarho.free.fr/100-ANS-D'EO.pdf](http://deltarho.free.fr/100-ANS-D'EO.pdf)).

oni povas legi (kaj la frazeroj kursivigitaj de mi estas substrekitaj en lia franclingva manuskripta letero):

"*Esperanto trairas krizon. Necesas ke ĉiuj tiuj kiuj estas sindonemaj al la esperantista afero intertuŝu la kubutojn kaj densigu la vicojn ĉirkaŭ la flago!*"<sup>83</sup>

Ĉiukaze, al Harold TARRY oni almenaŭ ŝuldas, laŭ ja stranga maniero, la savon de la gazeto, i.a. ĉar proponante al HODLER kunlabori pri ĝi, li senvole inspiris al li fariĝi lia posteulo. Tion Hector malkaŝis al sia amiko BERTHELOT, la 9-an de februaro 1907, tri tagojn antaŭ la apero de la unua numero de la nova serio, skribante:

"Jam en tiu epoko, venis al mia menso la ideo transpreni la ĵurnalon, ne ĉar la afero ŝajnis al mi iel mondonpova – eĉ nun ĝi ne ŝajnas al mi tia – sed nur pro la cirkonstancoj, kiuj preskaŭ devigis min al tio."<sup>84</sup>

Kaj eĉ al TARRY mem, Hector HODLER jam skribis, la 20-an de oktobro 1906:

"Ni cetere estas pretaj rekoni ĉion kion vi faris por savi la ĵurnalon."<sup>85</sup>

## ARTIKOLO-FINO

[plus, eventuale, la jeno, ĉu ne aldoninda? ja se ankoarŭ eblas]

### Aldona atentigo pri la 36-paĝa 12-lingva meteorologia vortareto (1931)

Laŭ la antaŭparolo, ĉe la unua kajero de la verko kies 7-a, lasta kajero estas la "nemalhavebla" vortareto, en la komenco Esperanto jam estis inter la ses unuaj antaŭviditaj lingvoj (al kiuj do intertempe aldoniĝis ses pliaj):

"(...) Inter tiuj lingvoj mi enmetigis Esperanton, la helpan lingvon kiu, morgaŭ, ebligos la internaciajn sciencajn interŝanĝojn, fariĝintajn ege penigaj pro la multiĝado de la naciaj lingvoj post la [unua mond-]milito."<sup>86</sup>

---

<sup>83</sup> "L'Esperanto traverse une crise. Il faut que tous ceux qui sont dévoués à la cause esperantiste se sentent les coudes et serrent les rangs autour du drapeau." (Letero de Harold TARRY al Hector HODLER, 25-an de novembro 1907, p. [4] (AJB, HH-1020-0420).)

<sup>84</sup> Plejverŝajne malneto de letero, interrompita antaŭ la fino de ties dua flanko, de Hector HODLER al [Paul BERTHELOT], datita: "Genevo, 9<sup>an</sup> de februaro 1907 (HH-1020-0589), p. [2]. Sur letera papero kun jena leterfronto: **Esperanto / Ĉiusemajna internacia Gazeto** / Organo de la Esperantaj Konsuloj, Oficoj kaj peresperantaj Societoj. / Tutmonda Informilo. / Direkcio: 8, Rue Bovy-Lysberg, 8 / Genevo-Svislando."

<sup>85</sup> Plejverŝajne malneto, pro nefinita postskribo, de subskribita letero de H. HODLER al "Monsieur Harold Tarry", datita: "Genève, 20/X [oktobro]/[19]06" (AJB, HH-1020-0588). Mia traduko de: "Nous sommes du reste disposés à reconnaître tout ce que v[ou]s avez fait pour sauver le journal, depuis le départ de M. Berthelot (...)"

<sup>86</sup> "Enfin, j'ai considéré comme indispensable de faire figurer dans le lexique un vocabulaire, en six langues, des noms cités; parmi ces langues j'ai fait figurer l'esperanto, la langue auxiliaire qui, demain, rendra possibles les échanges scientifiques internationaux devenus extrêmement pénibles par la multiplication des langues nationales depuis la guerre." (DELCAMBRE, "Préface", en Office National Météorologique de France, *Lexique météorologique*, publié sous la Direction du Général DELCAMBRE, Directeur de l'Office National de Météorologie, Paris: Etienne Chiron, MCMXXVI [1926], (65 p.), p. 6, à [http://bibliotheque.meteo.fr/exl-php/util/documents/accede\\_document.php?1632834166718](http://bibliotheque.meteo.fr/exl-php/util/documents/accede_document.php?1632834166718), konsultita la 28-9-2021).

## Resumo

Ni unue interesiĝos pri stranga grandioza projekto, ne realigita – sed fakte tute realigebla... – , subtenita i.a. de franca eksa politeknikano... tiam ja *ankoraŭ ne* esperantisto ĉar tio okazis ĵus antaŭ la naskiĝo mem de la lingvo. Do la maro en Saharo ĉiuokaze estintus scienc-teknika apliko *ne* de Esperanto, sed nur forte apogita de tiam *baldaŭa* esperantisto, kaj poste priskribita de alia franca esperantisto, Jules VERNE: en sia lasta finita romano manuskripte titolita de li, en 1904, *La Mer saharienne*, sed fine aperinta kun la titolo "Invado de la maro".

Kaj en dua, ĉefa parto, dank'al dudeko da neeldonitaj leteroj inter la tri unuaj redaktoroj de la revuo *Esperanto*, ni ĉefe studos la efemeran rolon de tiu sama Harold TARRY, kiel dua ĉefredaktoro en 1906: inter Paul BERTHELOT, ties fondinto en 1905, kaj Hector HODLER, kiu plene transprenis la taskon nur komence de 1907. Tio iomete kompletigas nian kontribuon al la ~~tuj-aperonta~~ dulingva libro *Hector Hodler: Pacisma sinteno* (**Ĝenevo: Éditions Notari, 2020, 232 p.**), kun kontribuo ankaŭ de Ulrich LINS, kaj antaŭparolo kaj tradukoj de Mireille GROSJEAN, **tiam** ILEI-prezidantino.